

12 KAZOJ DE SINJORO JANÍK

Tiu sinjoro Janík estas nek d-ro Janík el ministerio, nek tiu Janík, kiu pafmortigis bienulon Jirsa, nek tiu makleristo Janík, pri kiu oni rakontas, ke li faris serion de tricent dudek ses karamboloj, sed sinjoro Janík, ĉefo de firmao Janík kaj Holeček, grandkomercejo per papero kaj celulozo; li estas tia deca kaj ne alta sinjoro iam svatiĝinta al fraŭlino Severová kaj poste pro malespero needziĝinta; mallonge tiel dirita paperisto Janík, por ke ne estiĝu eraro.

Do tiu sinjoro Janík venis al la aferoj absolute hazarde, kaj nome ie en Sázava, kie li somerumadis; tio estis tiam, kiam oni serĉis kadavron de Roza Regner, kiun murdis ŝia fianĉo Henriko Bašta, surverŝis per petrolo, forbruligis kaj enfosis en arbaro. Bašta kulpis pri murdo de Roza, sed ŝian korpon aŭ ostojn oni ne povis trovi; jam naŭ tagojn traŭradis ĝendarmoj arbarojn, kondukataj de Bašta, kiu montradis al ili, tie aŭ alie ĝi estis, ili rastis kaj fosis, sed nenie io. Estis evidente, ke la mortlaca Bašta logas ilin for de ĝusta spuro kaj klopodas akiri tempon. Li estis junulo el honesta kaj bonstata familio, tiu Henriko Bašta, sed versimile doktoro iel premdifektis per forcepso lian kapon, antaŭ ol li naskiĝis, mallonge iel li ne estis en ordo; tia de-generinta kaj stranga homo li estis. Do naŭ tagojn li kondukis ĝendarmojn tra la arbaroj, pala kiel fantomo, kun okultikoj pro hororo, ĝene lin rigardi. Ĝendarmoj vadis kun li tra mirtelarbustoj kaj marĉoj, furiozis jam, mire ke ili ne mordis kaj pensis, bestio, ni lacigos vin tiel, ke fine tamen vi alkondukos nin tien. Bašta, apenaŭ treniĝante pro senfortiĝo, sinkis kie ajn sur la teron kaj raŭkis: "Jen, ĉi tie mi ŝin enfosis!" "Ek, Bašta," alkriaĉis lin ĝendarmo. "Ĉi tie ĝi ne estis. Plue!" Bašta ŝancele leviĝis, kaj faliris survoje iom plu, ĝis li denove rulfalis pro laco. Do tia estis la procesio: kvar ĝendarmoj, du detektivoj, kelkaj arbar-gardistoj kaj uloj kun hakfosiloj; kaj spasme ŝoviĝanta, palega homruino, Henriko Bašta.

12 PŘÍPADY PANA JANÍKA

Ten pan Janík není ani dr. Janík z ministerstva, ani ten Janík, co zastřelil statkáře Jirsu, ani ten senzál Janík, o kterém se říká, že udělal sérii tří set dvaceti šesti karambolů, nýbrž pan Janík, šéf firmy Janík a Holeček, velkoobchod s papírem a celulózou; on je to takový slušný a trochu menší pán, co kdysi chodil za slečnou Severovou a pak už se z desperace neoženil; zkrátka takřčený papírník Janík, aby nebylo mýlky.

Tedy ten pan Janík se dostal k těm věcem čirou náhodou, a sice někde na Sázavě, kde býval na letním bytě; to bylo tehdy, když hledali mrtvolu té Růženy Regnerové, co ji zavraždil její ženich Jindřich Bašta, polil nebožku petrolejem, spálil a zahrabal v lese. Bašta byl sice usvědčen, že Růženu zabil, ale její tělo nebo kosti nemohli nalézt; devět dní už chodili četníci po lesích, jak je Bašta vodil a ukazoval jim, tuhle nebo tamhle to bylo, hrabali a kopali, ale nikde nic. Bylo zřejmo, že uštvaný Bašta je svádí ze správné stopy nebo hledí získat čas. Byl to mládenec ze slušné a zámožné rodiny, ten Jindřich Bašta, ale nejspíš mu doktor nějak zmáčkl kleštěmi hlavu, nežli přišel na svět, zkrátka nebylo to s ním jaksi v pořádku; takový zvrhlý a divný člověk to byl. Tedy devět dní vodil četníky po lesích, bledý jako strašidlo, s očima těkajícíma nystagmem hrůzy, trapno se na něho podívat. Četníci se s ním brodili borůvkým a marastem, zuřiví už, div nekousali, a mysleli si, bestie, my tě utaháme tak, že nás tam nakonec přece jen dovedeš! Bašta, stěží se vleka vysílením, klesl kdekoliv na zem a chraptěl: "Tady, tady jsem ji zahrabal!" "Vstaň, Bašto," zařval na něho četník. "Tady to nebylo! Dál!" Bašta se potácivě zvedl a pletl nohama o kousek cesty dál, pokud se zase nezhroutil únavou. Tedy takový průvod to byl: čtyři četníci, dva civilní, pár hajných a strejci s motykami; a křečovitě se posunující, zsinalý vrak člověka, Jindřich Bašta.

Sinjoro Janík konatiĝis kun la ĝendarmoj en gastejo; sekve de tio li rajtis iradi tra la arbaroj kun la tragedia procesio, sen ke iu bruskis lin, ke tie li havas nenion por fari. Krome li portadis kun si sardinskatojn, salamon, konjakon kaj aliajn tiajn aĵojn, kiuj al tiuj sinjoroj konvenis.

La naŭan tagon jam estis malbone, tiom malbone, ke sinjoro Janík decidiĝis: neniam plu mi kuniros. La ĝendarmoj jam preskaŭ bojis pro ekscitego, la arbar-gardistoj deklaris, ke da ĉio estas ĝiskole kaj ke ili havas aliajn farotaĵojn, la uloj kun hakfosiloj grumblis, ke por tia laboraĉo estas malmulte dudek kronojn tage, kaj sur la tero tremis Henriko Baŝta fallaca de konvulsiaj skuoj, jam ne plu respondante kriadon kaj insistegadon de la ĝendarmoj.

En tiu senkonsila kaj senelira momento faris sinjoro Janík agon, kiu iel ne estis en la programo: li ekgenuis ĉe Baŝta, enmanigis al li bulkon kun ŝinko kaj diris komplate: "Rigardu, sinjoro Baŝta - nu nu, sinjoro Baŝta, ĉu vi aŭdas?" Baŝta ekhurlis kaj ekploris. "Mi trovos tion ... mi trovos tion, sinjoro," li plorsingultis kaj provis stariĝi; tuj estis ĉe li unu el la detektivoj kaj levis lin preskaŭ tenere. "Nur apogu vin, sinjoro Baŝta," li persvadis lin, "sinjoro Janík vin prenos de la dua flanko, tiel. Nu, sinjoro Baŝta, nun vi montros al sinjoro Janík, kie ĝi okazis, jes."

Horon poste staris Henriko Baŝta, fumante cigaredon, super malprofunda kavo, el kiu elstaris femurosto. "Ĉu tio estas korpo de Roza Regner?" demandis la ĉefserĝento Trnka deprimite. "Estas," diris trankvile Henriko Baŝta kaj fingre defrapis cindron de la cigaredo en la malfermitan kavon. "Ĉu sinjoroj deziras ankoraŭ ion?"

"Sciu, sinjoro," predikis vespere en gastejo ĉefserĝento Trnka al sinjoro Janík, "vi estas psikologo, tion oni devas lasi al vi. Je la sano, sinjoro! La ulo moliĝis, tuj kiam vi diris al li 'sinjoro Baŝta'. Li ŝatas la honoron, mizerulo! Kaj ni turmentis nin kun li - Mi petas vin, kiel vi ekkonis, ke la ĝentileco tiel efikos je li?"

Pan Janík se znal s četníky z hospody; následkem toho směl chodit po lesích s tím tragickým původem, aniž se na něho někdo utřhl, že tu nemá co dělat. Mimoto nosil s sebou krabičky se sardinkami, salám, koňak a jiné takové věci, které přišly těm pánům vhod.

Devátého dne už bylo zle, tak zle, že pan Janík se rozhodoval: víckrát s sebou nepůjdu. Četníci už přímo štěkali podrážděným vztekem, hajní prohlásili, že už toho mají dost a že mají jiné věci na práci, strejci s motykami bručeli, že za tuhle rachotu je dvacet korun denně málo, a zhroucen na zemi třásl se Jindřich Bašta křečovitými záchvěvy, už ani neodpovídaje na křik a hartusení četníků.

V tu bezradnou a pustou chvíli udělal pan Janík věc, která jaksí nebyla v programu: klekl k Baštovi, strčil mu do ruky housku se šunkou a řekl lítostivě: "Koukejte se, pane Bašto – no tak, pane Bašto, slyšíte?" Bašta zavyl a vypukl v pláč. "Já to najdu... já to najdu, pane," vzlykal a pokoušel se vstát; vtom už byl u něho jeden z tajných a zvedal ho téměř něžně. "Jen se opřete, pane Bašto," domlouval mu, "pan Janík vás vezme z druhé strany, tak. No tak, pane Bašto, teď ukážete panu Janíkovi, kde to bylo, že jo." Hodinu nato stál Jindřich Bašta, kouře cigaretu, nad mělkou jámou, ze které vyčuhovala stehenní kost. "To je tělo Růženy Regnerové?" ptal se strážmistr Trnka sevřeně. "Je," řekl klidně Jindřich Bašta a sklepnul prstem popel z cigarety do otevřené jámy. "Přejí si pánové ještě něco?"

"Víte, pane," kázal večer v hospodě strážmistr Trnka panu Janíkovi, "vy jste psycholog, to se vám musí nechat. Na zdraví, pane! Chlap změknu, jen jak jste mu řekl 'pane Bašto'. Ten si potrpěl na čest, mizera jeden! a my, my se s ním tahali – Prosím vás, jak jste poznal, že na něj ta zdvořilost bude tak působit?"

"Tio," diris la heroo de l' tago, modeste ruĝigante, "tio estis nur hazarde, jes? Mi, sciu, al ĉiu mi diras 'sinjoro'. Nome mi kompatis lin, tiun sinjoron Baŝta, kaj tial mi volis doni al li la bulkon -" "Instinkto," deklaris ĉefserĝento Trnka. "Tion ni nomas flarsento kaj psikologio. Je la sano, sinjoro Janík! Domaĝe pri vi, vi devus iri al ni -"

Nelonge poste veturis sinjoro Janík per nokta trajno al Bratislavo; tie estis ĝenerala akciula kunveno de iu slovaka paperfabriko kaj ĉar sinjoro Janík havis en ĝi egan partoprenon, li volis ĉe tio esti. "Antaŭ Bratislavo vi devas min vekti," li admonis konduktoron, "por ke oni ne veturigu min ĝis la limo." Poste en litvagono li enlitiĝis, ĝojante, ke li estas sola en kupeo, kuŝiĝis bele kiel mortinto, momenton konsideris diversajn negocajn kaj ekdormis.

Li eĉ ne sciis, kiam ĝi okazis, kiam la konduktoro malfermis la kupeon al iu sinjoro, kiu komencis senvestiĝi kaj grimpis en la supran liton. Sinjoro Janík vidis ankoraŭ en duondormo paron da krurumoj kaj pendolantajn neordinare vilajn krurojn, aŭdis ĝemadon de homo envolviĝanta en kovrilojn, poste klakis ŝaltilo kaj denove estis brueganta mallumo.

Sinjoro Janík songis tion kaj alion, plejparte, ke lin persekutas la vilaj kruroj, kaj poste vekigis tial, ĉar estis longa silento kaj ĉar li aŭdis iun ekstere voki: "Ĝis la revido en Žilina!" Kaj li salte ellitiĝis kaj ekrigardis tra la fenestro: li vidis, ke ekstere tagiĝas, ke la trajno jam haltas en stacidomo de Bratislavo kaj ke la konduktoro forgesis lin vekti. Pro la ektimo li eĉ ne komencis insulti kaj en febra rapido li survestis pantalonon sur piĝamon kaj la ceteran vestaĵon, enpoŝigis siajn kvin aĵojn kaj elsaltis sur kajon ĝuste en momento, kiam la stacidoma oficisto jam levis la manon por forveturo de l' trajno. "Uf," forkraĉis sinjoro Janík, pugne minacis la forveturantan rapidtrajnon kaj iris en tualetejon sin finvesti.

"To," pravil hrdina dne skromně se zardívaje, "to bylo jen tak, víte? Já, víte, já říkám každému ‚pane‘. Totiž mně ho bylo líto, toho pana Bašty, a tak jsem mu chtěl dát tu housku –" "Instinkt," prohlásil strážmistr Trnka. "Tomu já říkám čuch a psychologie. Na zdraví, pane Janík!! Vás je škoda, vy byste měl jít k nám –"

Nějaký čas nato jel pan Janík nočním vlakem do Bratislavy; byla tam valná hromada akcionářů nějaké slovenské papírny, a protože pan Janík byl na ní hodně angažován, chtěl při tom být. "Musíte mne před Bratislavou vzbudit," domlouval konduktérovi, "aby mě nezavezli až na hranice." Načež vlezl ve spacím voze do lůžka, rád, že je v kupé sám, uložil se pěkně jako nebožtík, chvilku uvažoval o různých obchodech a usnul.

Ani nevěděl, kdy to bylo, když konduktér otevřel kupé jakémusi pánovi, který se začal svlékat a vyšplhal se do hořeniho lůžka. Pan Janík v polosnu viděl ještě pár nohavic a bimbající se neobyčejně chlupaté nohy, slyšel hekání člověka, který se zahrabává do přikrývek, pak cvakl vypínač a byla zase rachotící tma.

Panu Janíkovi se zdálo to a ono, ponejvíce, že ho pronásledují jakési chlupaté nohy, a pak se probudil tím, že bylo dlouhé ticho a že slyšel někoho venku volat: "Na shledanou v Žilině!" I vyskočil z lůžka a podíval se oknem; viděl, že venku svítá, že vlak už stojí na bratislavském nádraží a že ho konduktér zapomněl vzbudit.

Pro samé leknutí nezačal ani nadávat a v horečné rychlosti si navlékl přes pyžama kalhoty a ostatní šatstvo, nastrkal do kapes svých pět švestek a vyskočil na perón ve chvíli, kdy nádražní úředník už zvedl ruku k odjezdu vlaku. "Uf," odplivl si pan Janík, zahrozil za odjíždějícím rychlíkem pěstí a šel se na toaletu doobléci.

Kiam fine li estis reordiganta enhavon de siaj poŝoj, li rigidiĝis de hororo: en la interna poŝo li havis anstataŭ unu papermonujo du. En la pli dika el ili, ne apartenanta al li, estis sesdek novaj ĉeĥoslovakaj kvincentkronoj. Ĝi estis versimile monujo de lia nokta kunvojaĝanto; sed kiel ĝi aperis en lia poŝo, tion la duondormema sinjoro Janík sciis imagi pro nenio en la mondo.

Bone, memkomprene, unue li serĉis iun de polico, por transdoni al li la fremdan papermonujon. La polico lasis sinjoron Janík tempeton mortadi pro malsato kaj dume telefonis al Galanta, ke oni anoncu tie al vojaĝanto sur la lito 14, ke lia monujo kun mono troviĝas ĉe la polico en Bratislavo. Poste sinjoro Janík devis anonci siajn person-indikojn kaj iris matenmanĝi.

Poste lin serĉis policano kaj demandis lin, ĉu ne okazis eraro; tiu sinjoro sur la lito 14 nome deklaris, ke al li mankas neniuj monujo. Sinjoro Janík devis denove iri al la policejo kaj duafoje rakonti, kiel li akiris la monujon. Dum du civiluloj ien forportis la sesdek bankbiletojn, sinjoro Janík devis duonhoron atendi inter du detektivoj, post kio oni lin forkondukis al iu altranga polica sinjoro.

"Sinjoro," diris tiu sinjoro, "ĝuste ni telegrafas al Štúrovo, ke oni arestu pasaĝeron el la lito 14. Ĉu vi povas doni al ni lian precizan priskribon?" Sinjoro Janík ne povis diri pli multe, ol tion, ke la pasaĝero havis okulfrape vilajn kruojn.

La sinjoro de polico ne estis kun tio tre kontenta. "La bankbiletoj nome estas falsaĵo," li diris subite. "Vi devas ĉi tie resti, ĝis ni konfrontos vin kun la kunvojaĝinto." Sinjoro Janík malbenis ĉe si la konduktoron, kiu ne vekis lin ĝustatempe kaj per tio kaŭzis, ke en tiu hasto aperis en la poŝo de sinjoro Janík la malbenita papermonujo.

Proksimume post unu horo venis depeŝo el Štúrovo, ke la vojaĝinto el la lito 14 elvoniĝis jam en Nové Zámky; kien li poste iris aŭ veturis, ne estas provizore konate.

Když konečně přerovnával obsah svých kapes, strnul hrůzou: v náprsní kapse měl místo jedné tašky s penězi dvě. V té tlustší z nich, která nebyla jeho, bylo šedesát nových československých pětisetkorun. Byla to patrně tobolka jeho nočního spolucestujícího; ale jak se mu dostala do kapsy, to si rozespálý pan Janík nedovedl za živého boha představit.

Dobrá, to se rozumí, nejdřív se sháněl po někom od policie, aby mu odevzdal tu cizí tašku. Policie nechala pana Janíka chvíli umírat hladem a zatím telefonovala do Galanty, aby tam oznámili cestujícímu na lůžku číslo 14, že jeho tobolka s penězi je na policii v Bratislavě. Pak pan Janík musel udat své personálie a šel se nasnídat.

Potom ho hledal člověk od policie a ptal se ho, není-li to mejlka; ten pán na lůžku číslo 14 totiž prohlásil, že žádné tobolky nepohřešuje. Pan Janík musel jít znovu na policii a vykládat podruhé, jak k té tobolce přišel. Zatím dva páni v civilu si těch šedesát bankovek někam odnesli, pan Janík musel půl hodiny čekat mezi dvěma detektivy, načež ho odvedli k nějakému velkému pánovi od policie. "Pane," řekl ten pán, "právě telegrafujeme do Parkáň-Nány, aby byl zadržen cestující na lůžku číslo 14. Můžete nám dát jeho přesný popis?" Pan Janík nemohl říci o mnoho více, než že ten cestující měl nápadně chlupaté nohy.

Pán od policie tím nebyl příliš spokojen. "Ty bankovky jsou totiž padělek," pravil náhle. "Musíte tu zůstat, až vás budeme konfrontovat s tím spolucestujícím." Pan Janík v duchu proklínal konduktéra, který ho nevzbudil včas a tím zavinil, že se panu Janíkovi v tom chvatu dostala do kapsy ta zlořečená taška. Asi za hodinu došla z Parkáň-Nány depeše, že cestující na lůžku číslo 14 vystoupil už v Nových Zámkách; kam šel nebo jel potom, není zatím známo.

"Sinjoro Janík," diris fine tiu altranga sinjoro de la polico, "dume ni ne retenos vin; la aferon ni cedos en Prago al inspektoro Hruška, kiu estas eksperto pri falsaĵoj; sed mi diras al vi, ke ĝi estos versimile ege grava afero. Revenu kiel eble plej frue en Pragon, kaj tie oni vin alvokos. Dume mi dankas al vi, ke vi tiel feliĉe trafis la falsaĵojn. Sinjoro, tio ne estas nur ia hazardo."

Apenaŭ sinjoro Janík revenis en Pragon, jam oni venigis lin al la polica prezidantaro; tie lin akceptis iu granda kaj korpulenta sinjoro, kiun ĉiuj nomis sinjoro prezidanto; kaj iu flava kaj tendena homo, nomata inspektoro Hruška.

"Sidiĝu, sinjoro Janík," diris la korpulenta sinjoro kaj disŝiris sigelojn sur malgranda pakajeto. "Ĉu ĉi tio estas la papermonujo, kiun vi... eh, kiun vi trovis en via poŝo en stacidomo de Bratislavo?" "Estas, mi petas," elspiris sinjoro Janík. La korpulenta sinjoro rekalkulis la novajn bankbiletojn, troviĝantaj en la papermonujo. "Sesdek ekzempleroj," li diris. "Ĉiuj havas serion 27.451. Tiun numeron oni signalis al ni el Cheb."

La tendena homo prenis en la manon unu bankbileton, fermis la okulojn kaj frotetis ĝin inter la fingroj, post kio li flaris al ĝi. "Do ĉi tiuj estas el Graz," li diris. "Tiuj el Ĝenevo ne estas tiom gluecaj." "Graz," ripetis la korpulenta sinjoro mediteme, "tie oni faras ĉi tion por Budapeŝto, ĉu?" La tendena homo nur okulsignis. "Do mi estu veturonta al Vieno," li opiniis. "Sed la viena polico ne ekstradicios al ni tiun ulon."

"Hm," murmuris la korpulenta sinjoro. "Do poste klopodu venigi lin alie al ni. Se tio ne sukcesus, diru al ili, ke ni por li ekstradicios al ili Leberhardton. Feliĉan vojaĝon, Hruška. Kaj vi, sinjoro," li diris turnante sin al sinjoro Janík, "mi eĉ ne scias, kiel danki al vi. Vi estas tiu, kiu trovis la knabinon de Henriko Baŝta, ĉu?" Sinjoro Janík ruĝigis. "Tio estis nur ia hazardo," li diris rapide. "Vere mi... neniel mi havis intencon..." "Vi havas feliĉan manon," diris apreze la korpulenta sinjoro. "Sinjoro Janík, tio estas donaco de Di-sinjoro.

"Pane Janíku," ŝekl koneĉne ten vysoký pán od policie, "zatím vás nebudeme zdržovat; my tu věc postoupíme do Prahy inspektoru Hruškovi, co je přes tyhle falzifikáty; ale já vám řeknu, že to asi bude moc vážná věc. Vraťte se co nejdřív do Prahy, a oni si vás tam zavolají. Zatím vám děkuju, že jste tak šťastně kápl na ty padělky. Pane, to není jen tak náhoda."

Sotva se pan Janík vrátil do Prahy, už ho volali na policejní prezidium; tam ho přijal jeden ohromný a zavalitý pán, kterému všichni říkali pane prezidente, a jeden žlutý a šlašitý člověk, který se jmenoval inspektor Hruška.

"Sedněte si, pane Janíku," pravil zavalitý pán a roztrhl pečetě na malém balíčku. "Je tohle ta tobolka, co jste... eh, co jste našel ve své kapse na bratislavském nádraží?" "Je prosím," vydechl pan Janík. Zavalitý pán přepočítal nové bankovky, které byly v té tašce. "Šedesát kusů," řekl. "Všechny mají sérii 27 451. To číslo jsme už dostali signalizováno z Chebu."

Šlašitý člověk vzal do ruky jednu bankovku, zavřel oči a mnul ji v prstech, načež k ní přičichnul. "Tak tyhle jsou ze Štýrského Hradce," řekl. "Ty ze Ženevy nejsou tak lepkavé." "Štýrský Hradec," opakoval zavalitý pán zamyšleně, "tam dělají tyhle věci pro Pešť, že?" Šlašitý člověk jenom mrknul. "To abych jel do Vídně," mínil. "Ale vídeňská policie nám toho chlapa nevydá."

"Hm," bruĉel zavalitý pán. "Pak ho k nám hleďte dostat jinak. Kdyby to nešlo, tak jim řekněte, že jim za něj dáme Leberhardta. Šťastnou cestu, Hruško. A vy, pane," pravil obraceje se k panu Janíkovi, "já ani nevím, jak bych vám měl poděkovat. Vy jste ten, co našel tu holku Jindřicha Bašty, že?" Pan Janík se zapálil. "To byla jen taková náhoda," řekl honem. "Já skutečně... já jsem neměl nijak v úmyslu..." "Máte šťastnou ruku," děl uznale zavalitý pán. "Pane Janíku, to už je takový dar od pána boha.

Iu dum la tuta vivo nenion trovas, kaj la alia ĝuste stumblas je la plej bonaj kazoj. Vi devus iri al ni, sinjoro Janík." "Ne eblas," defendis sin sinjoro Janík. "Mi... nome mi havas mian komercejon... bone prosperantan... malnova firmo post la avo..." "Kiel vi volas," ekĝemis la granda viro, "sed domaĝe pri vi. Tian damnan feliĉon ne ĉiu facile havas. Ni ankoraŭ revidos nin, sinjoro Janík."

Kelkajn monatojn poste vespermanĝis sinjoro Janík kun sia komerc-amiko el Lipsiko. Kompreneble tia komerca vespermanĝo jam ion valoras; ĉefe la konjako estis iel ekstre bona; mallonge, sinjoro Janík nepre ne emis iri piede hejmen, mangestis kelneron kaj ordonis: "Aŭton!" Elirinte el la hotelo, li vidis, ke aŭto jam atendas ĉe elirejo; kaj li enaŭtiĝis, brufermis pordeton kaj en tiu humoro forgesis kiel je morto, ke li ne diris al ŝoforo sian adreson. Malgraŭ tio la aŭto ekveturis kaj sinjoro Janík, komforte sidiĝinte en angulo, ekdormis.

Kiel longe li veturis, li ne sciis; sed li vekigis tial, ĉar la veturilo haltis kaj la ŝoforo malfermis al li pordeton dirante: "Do jam ni estas ĉi tie, sinjoro. Vi estas ironta supren, sinjoro." Sinjoro Janík tamen tre miris, kie fakte li estas, sed ĉar post la konjako estis al li ĉio egala, li ascendis ian ŝtuparon kaj malfermis pordon, post kiu estis aŭdebla brua interparolo. Estis tie ĉirkaŭ dudek homoj, kiuj senpacience turniĝis al la pordo. Subite estiĝis stranga silento; iu el sinjoroj leviĝis kaj iris al sinjoro Janík: "Kion vi volas ĉi tie? Kiu vi estas?"

Sinjoro Janík mirigite ĉirkaŭrigardis; Li ekkonis kvin aŭ ses sinjorojn - ili estis riĉaj homoj, pri kiuj estis onidiroj, ke ili havas specifajn politikajn interesojn; sed sinjoro Janík ne miksiĝis en politikon. "Dio sanon donu," li diris amike, "tie estas sinjoro Koubek kaj sinjoro Heler. Ahoj, Feri! Junuloj, mi trinkus."

"De kie venas ĉi tiu ulo?" ekfuriozis unu el la ĉeestantoj. "Ĉu li apartenas al ni?" Du sinjoroj, elpuŝis sinjoron Janík en koridoron. "Kiel vi venis ĉi tien?" diris unu el ili abrupte. "Kiu vin invitis ĉi tien?" Sinjoro Janík sobriĝis post tiom malmulte amika voĉo.

Někdo po celý život nic nenajde, a jiný zrovna klopýtne o nejlepší případy. Měl byste se dát k nám, pane Janíku." "To nejde," bránil se pan Janík. "Já... totiž já mám svůj obchod... dobře prosperující... stará firma po dědečkovi..." "Jak chcete," vzdychl veliký muž, "ale je vás škoda. Takové zatracené štěstí hned tak někdo nemá. My se ještě uvidíme, pane Janíku."

Nějaký měsíc nato večerel pan Janík se svým obchodním přítelem z Lipska. To se rozumí, taková obchodní večere už stojí za to; zejména koňak byl jakýsi zvláště dobrý; zkrátka panu Janíkovi se naprosto nechtělo jít domů pěšky, i kývl rukou na sklepníka a kázal: "Auto!" Když pak vyšel z hotelu, viděl, že auto už čeká u vchodu; i vlezl dovnitř, zabouchl dvířka a v té náladě zapomněl jako na smrt, že neřekl šoferovi svou adresu. Nicméně auto se rozjelo a pan Janík, pohodlně složen v koutě, usnul.

Jak dlouho jel, to nevěděl; ale probudil se tím, že se vůz zastavil a šofér mu otevřel dvířka pravě: "Tak už jsme tady, pane. Máte jít nahoru, pane." Pan Janík se sice velmi divil, kde vlastně je, ale protože mu po tom koňaku bylo všechno jedno, šel po nějakých schodech nahoru a otevřel dveře, za kterými slyšel hlučný hovor. Bylo tam asi dvacet lidí, kteří se nedočkavě obrátili ke dveřím. Náhle nastalo divné ticho; jeden z pánů vstal a šel k panu Janíkovi: "Co tu chcete? Kdo jste?"

Pan Janík se udiveně rozhlížel; poznal pět nebo šest pánů, – byli to bohatí lidé, o kterých se proslýchalo, že mají jakési zvláštní politické zájmy; ale pan Janík se do politiky nemíchal. "Pozdrav bůh," řekl přátelsky, "tamhle je pan Koubek a pan Heller. Tě péro, Ferry! Mládenci, já bych pil."

"Kde se tu bere ten chlap?" rozzuřil se jeden z přítomných. "Copak on patří k nám?" Dva páni vytlačili pana Janíka na chodbu. "Kde jste se tu vzal?" řekl jeden z nich ostře. "Kdo vás sem pozval?" Pan Janík vystřízlivěl tímto málo přátelským hlasem.

"Kie mi estas?" li diris indigne. "Diable, kien vi alveturigis min?" Unu el la sinjoroj kurdescendis ŝtuparon kaj ĵetiĝis al la ŝoforo: "Vi idioto," li kriaĉis, "de kie vi prenis tiun homon?" "Nu antaŭ la hotelo," defendis sin la ŝoforo. "Posttagmeze oni diris al mi, ke je la deka vespere mi atendu ĉe hotelo iun sinjoron kaj alveturigu lin ĉi tien. Tiu sinjoro je la deka enaŭtiĝis ĉe mi kaj nenion diris al mi; do mi veturis direkte ĉi tien -" "Jesuomaria," kriis la sinjoro malsupre, "li estas ja iu alia! Homo, vi tion fuŝis al ni!"

Sinjoro Janík sidiĝis rezigne sur la ŝtuparo. "Ha," li diris kontente, "tio estas ia sekreta kunveno, ĉu? Nun vi devas min strangoli kaj enfosi. Glason da akvo!" "Sinjoro," diris unu el la du. "Vi eraris. Tie interne estas nek sinjoro Koubek, nek sinjoro Heler, ĉu vi komprenas? Tio estas eraro. Ni transveturigis vin en Pragon; vi devas pardoni, ke okazis la miskompreno." "Nenio okazis," diris grandanime sinjoro Janík. "Mi scias, ke la ŝoforo min dumvoje pafmortigos kaj enfosis ie en arbaro. Jam estas egale. Mi idioto forgesis doni al li mian adreson; jen la rezulto."

"Vi estas ebria, ĉu?" demandis la nekonata sinjoro kun ia senpeziĝo. "Parte," konsentis sinjoro Janík, "sciu, mi vespermanĝis kun dresdena Meyer. Janík, grandkomercisto kun papero kaj celulozo," li prezentis sin sidante sur la ŝtuparo. "Malnova entrepreno, post la avo." "Iru dormi," konsilis al li la nekonata sinjoro. "Post kiam vi satdormos, eĉ vi ne rememoros, ke - hm, ke ni vin tiel ĝenis." "Tute ĝuste," opiniis sinjoro Janík digne. "Iru dormi, sinjoro. Kie mi havas liton?" "Hejme," diris la fremda sinjoro. "La ŝoforo vin forveturigis hejmen. Permesu, ke mi helpu vin leviĝi." "Ne estas bezone," protestis sinjoro Janík. "Mi ne estas tiom ebriaĉa kiel vi. Iru dormi. Ŝoforo, Bubeneč!" La aŭto ekveturis retre; kaj sinjoro Janík ruze palpebrumante, atentis, tra kie li estas veturigata.

La postan matenon li telefonis al la polica prezidantaro sian noktan aventuron. "Sinjoro Janík," respondis al li post kelka silentado voĉo el la prezidantaro, "ĉi tio estas por ni ege interesa.

"Kde to jsem?" pravil pohorŝeně. "U čerta, kam jste mne to dovezli?" Jeden z pánů seběhl ze schodů a vrhl se k šoferovi: "Vy idiote," řval, "kde jste toho člověka sebral?" "No před hotelem," bránil se šofér. "Mně odpoledne řekli, abych v deset hodin večer čekal u hotelu na nějakého pána a dovezl ho sem. Ten pán mně v deset hodin vlezl do vozu a nic mně neřekl; tak jsem jel rovnou sem -" "Ježíšmarjá," křičel pán dole, "vždyť je to někdo jiný! Člověče, vy jste nám to zavařil!"

Pan Janík si sedl rezignovaně na schody. "Aha," řekl uspokojeně, "to je nějaká tajná schůze, že? Teď mě musíte zardousit a zakopat. Sklenici vody!" "Pane," řekl jeden z těch dvou. "Vy jste se zmýlil. Tam uvnitř nebyl ani pan Koubek, ani pan Heller, rozumíte? To je omyl. My vás necháme odvézt do Prahy; musíte prominout, že se stalo to nedorozumění." "Nic se nestalo," řekl velkodušně pan Janík. "Já vím, že mě šofér cestou zastřelí a zahrabe v lese. To už je jedno. Já trouba mu zapomněl dát svou adresu; to mám z toho."

"Vy jste opilý, že?" ptal se neznámý pán s jistou úlevou. "Částečně," souhlasil pan Janík. "Víte, já jsem večerěl s drážďanským Meyerem. Janík, velkoobchodník s papírem a celulózou," představoval se sedě na schodech. "Starý závod, po dědečkovi." "Jděte se vyspat," radil mu neznámý pán. "Až se z toho vyspíte, ani si nevzpomenete, že - hm, že jsme vás tak vyrušili." "Zcela správně," mínil pan Janík důstojně. "Jděte se vyspat, pane. Kde mám postel?" "Doma," řekl cizí pán. "Šofér vás odveze domů. Dovolte, já vám pomohu vstát." "Není třeba," ohradil se pan Janík. "Já nejsem tak ožralý jako vy. Jděte se vyspat. Šofěre, Bubeneč!" Auto se rozjelo zpátky; a pan Janík, lišácky mrkaje, dával pozor, kudy ho to vezou.

Ráno nato telefonoval na policejní prezídium své noční dobrodružství. "Pane Janíku," odpověděl mu po chvilce mlčení hlas z prezídia, "tohle je pro nás moc zajímavé.

Mi petas vin insiste, ke vi tuj venu ĉi tien."

Kiam sinjoro Janík venis, atendis lin jam kvar sinjoroj kun tiu granda korpulenta frunte. Sinjoro Janík devis denove rakonti, kio okazis kaj kiun li vidis. "La aŭto havis markon NXX 705," aldiris la korpulenta sinjoro. "Privata veturilo. El la ses personoj, kiujn sinjoro Janík ekkonis, estas por mi tri novaj. Sinjoroj, nun mi lasos vin. Sinjoro Janík, iru al mi."

Sinjoro Janík sidis kiel amaseto en granda laborejo de la korpulenta sinjoro iranta tien kaj reen tre enpenŝiginta. "Sinjoro Janík," fine li diris, "antaŭ ĉio mi devas vin peti: al neniuj eĉ unu vorton. Ŝtataj kaŭzoj, ĉu vi komprenas?" Sinjoro Janík silente jesis. Kristo, li pensis, en kion mi denove enmiksiĝis! "Sinjoro Janík," diris subite la korpulenta vico, "mi ne volas vin flati, sed ni bezonas vin. Vi havas tian feliĉon - Oni diras metodo; sed detektivo, kiu tute ne havas la stultan bonŝancon, taŭgas por nenio. Ni bezonas homojn, kiuj havas feliĉon. Da racio ni mem havas sufiĉe; sed ni volus aĉeti feliĉan hazardon. Sciu, iru al ni." "Kaj kio mia komercejo?" flustris sinjoro Janík konsternite. "Tiu gvidos via kompaniano; domaĝe vin por tio kun tiu via donaco. Do kion?" "Mi ... mi tion ankoraŭ pripensos," balbutis malfeliĉa sinjoro Janík. "Mi venos al vi antaŭ fino de semajno; sed se tio devas esti ... kaj se mi havas la kapablon ... ankoraŭ mi ne scias; mi venos." "Bone," diris la korpulenta viro premante al li potence la manon. "Ne dubu pri vi. Ĝis la revido."

Semajno ankoraŭ ne pasis, kiam sinjoro Janík denove anonciĝis. "Do jam mi estas ĉi tie," li laŭtis kun radiantanta vizaĝo. "Ĉu decidiĝinta?" diris la korpulenta sinjoro. "Danke Dion," respiris sinjoro Janík. "Nome mi venas diri al vi, ke ĝi ne eblas kaj ke por tio mi ne taŭgas." "Pa! Kaj kial ne?"

"Konsideru," triumfis sinjoro Janík, "dum kvin jaroj priŝteladis min mia prokuristo, kaj mi ne malkovris tion! Mi idioto! Nu, diru mem, sinjoro, kia detektivo mi estus? Dank' al Dio! Kvin jarojn mi sidas kun tia fripono kaj scias pri nenio!

Prosím vás snažně, abyste se sem ihned dostavil."

Když se pan Janík dostavil, čekali ho už čtyři páni s tím velikým a zavalitým v čele. Pan Janík musel znovu vypravovat, co se stalo a koho viděl. "Auto mělo značku N XX 705," dodával zavalitý pán. "Soukromý vůz. Z těch šesti osob, které pan Janík poznal, jsou mně tři nové. Pánové, já vás teď nechám. Pane Janíku, pojd'te ke mně."

Pan Janík seděl jako oukropeček ve veliké pracovně zavalitého pána, který přecházel velmi zamyšlen. "Pane Janíku," pravil konečně, "především vás musím prosit: nikomu o tom ani slova. Státní důvody, rozumíte?" Pan Janík mlčky kývnul. Prokrista, myslel si, do čeho jsem se to zas dostal! "Pane Janíku," pravil náhle zavalitý muž, "já vám nechci lichotit, ale my vás potřebujeme. Vy máte takové štěstí – Ono se řekne metoda; ale detektiv, který nemá docela pitomou kliku, není k ničemu. My potřebujeme lidi, kteří mají štěstí. Rozumu máme sami dost; ale my bychom si chtěli koupit šťastnou náhodu. Víte co, pojd'te k nám." "A co můj obchod?" zašeptal pan Janík zdrceně. "Ten povede váš společník; vás s tím vaším darem je na to škoda. Tak co?" "Já... já si to ještě rozmyslím," koktal nešťastný pan Janík. "Já k vám přijdu do týdne; ale musí-li to být... a mám-li tu schopnost... já ještě nevím; já přijdu." "Dobrá," pravil zavalitý muž tiskna mu mohutně ruku. "Nepochybujte o sobě. Na shledanou."

Ani neuplynul týden, když se pan Janík znovu ohlásil. "Tak už jsem tady," hlaholil se zářící tváří. "Rozhodnut?" pravil zavalitý pán. "Zaplaťpánbůh," oddechl si pan Janík. "Já vám jdu totiž říci, že to nejde a že se k tomu nehodím." "Jděte! A pročpak ne?"

"Považte si," triumfoval pan Janík, "pět let mě okrádal můj prokurista, a já jsem na to nepřišel! Já idiot! Nu tak, řekněte sám, pane, jaký bych já byl detektiv? Chválabohu! Pět let sedím s takovým taškářem, a nevím o ničem!

Do vidu, ke por nenio mi taŭgas! Kaj jam tiom mi timis! Jesuomaria, tiel mi ĝojas, ke ĝi ne realiĝos. Nu, kaj nun mi estas for el la afero, ĉu? Mi dankas multfoje!"

Tak vidíte, že k ničemu nejsem! A já už měl takový strach! Ježíšmarjá, to jsem rád, že z toho nic nebude! Tak, a teď jsem z toho venku, že? Děkuju mnohokrát!"